

**NSiR - Nova Sento in Rete  
N. 1100 (27/2021)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta [fei@esperanto.it](mailto:fei@esperanto.it) ; internet  
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta [iej@esperanto.it](mailto:iej@esperanto.it) ; internet  
<http://iej.esperanto.it>

Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, [notiziario@esperanto.it](mailto:notiziario@esperanto.it)  
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

**NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR**

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

**ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA**

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

**LIBRERIA**

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

[feilibri@esperanto.it](mailto:feilibri@esperanto.it)

**INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA**

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

**IL 5 PER MILLE ALLA FEI**

Indicate il codice fiscale **8009577014** nella vostra dichiarazione dei redditi,  
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Maestri di Pace .....	2
- Interlingvistiko .....	2
- Local Guides di Google anche in esperanto .....	3
- Kampanjo Hans Bakker .....	3
- Aliĝilo kaj temo de la 10a UK Montreale .....	4
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton .....	5

## MAESTRI DI PACE

Gentili Amiche ed Amici,

è in partenza un nuovo ciclo di incontri promosso dall'Università per la pace "**Maestri di Pace: vite, pensieri, opere per la trasformazione nonviolenta della società**". Per conoscere il passato e trasformare il presente.

Primo appuntamento, finalmente in presenza, per **Venerdì 23 Luglio** alle ore **21,00 in Ancona** nel piazzale del Centro polifunzionale di Pietralacroce - Via Pietralacroce 45, con **anche diretta streaming sulla pagina FB dell'Università per la pace** <https://www.facebook.com/UnivPace/>

Il Prof. **Rocco Altieri** (Presidente Centro Gandhi di Pisa e Direttore Rivista Quaderni Satyagraha) e la nipote **Laura Lanza** intervorranno su Lanza del Vasto nell'incontro pubblico "**Vita comunitaria e nonviolenza in Lanza del Vasto, discepolo di Gandhi**".

L'incontro è organizzato nel rispetto dei protocolli anti-Covid. Contando sulla vostra partecipazione, vi inviamo i più cordiali saluti e l'invito a diffondere al meglio. *(NDR: purtroppo un problema tecnico mi ha impedito di pubblicare prima questo annuncio, e me ne scuso con gli organizzatori; ma poiché ci saranno altri incontri, ho voluto lo stesso farvi sapere di questo).*

## INTERLINGVISTIKO

Kaptu la okazon kaj aliĝu al la sekva interlingvistika grupo aŭ informu viajn konatulojn pri la universitataj studoj! Ili okazos plejparte rete. Jam estas aliĝantoj el Ĉinio, Koreio, Brazilo, Francio, Norvegio, Slovakio....

Ĝus aperis varbfilmeto por la nova interlingvistika grupo:  
<https://www.youtube.com/watch?v=-cvm2ybeKcs>

Vi povas trovi informojn en: <https://edukado.net/novajhoj?id=849> kun aliaj filmetoj kaj en la retejo de la studoj: <<http://interl.amu.edu.pl>>  
<http://interl.amu.edu.pl> Intervjuo kun la gvidanto de la Studoj en:  
<[http://pola-retradio.org/2021/04/e\\_elsendo-el-la-07-04-2021/](http://pola-retradio.org/2021/04/e_elsendo-el-la-07-04-2021/)>  
[http://pola-retradio.org/2021/04/e\\_elsendo-el-la-07-04-2021/](http://pola-retradio.org/2021/04/e_elsendo-el-la-07-04-2021/)

Prezento de la Interlingvistikaj studoj fone de universitata instruado:  
<https://esfconnected.org/2021/07/09/interlingvistikaj-studoj-uam-poznano-pl/>  
Se vi bezonas pluajn informojn aŭ volas aliĝi, skribu al:  
[interlin@amu.edu.pl](mailto:interlin@amu.edu.pl)

Ni atendas vin! En la nomo de la instruista stabo Ilona Koutny (gvidanto de la Studoj)

Ilona Koutny

## LOCAL GUIDES DI GOOGLE ANCHE IN ESPERANTO!

Se fate recensioni di luoghi su Google, potreste anche voi essere delle Guide Locali, consultati da altri. Queste informazioni esistono anche in esperanto:

[https://www.localguidesconnect.com/t5/Announcements/Celebrating-Connect-s-5th-Birthday/ba-p/2973865?utm\\_source=email&utm\\_medium=connect&utm\\_campaign=birthday](https://www.localguidesconnect.com/t5/Announcements/Celebrating-Connect-s-5th-Birthday/ba-p/2973865?utm_source=email&utm_medium=connect&utm_campaign=birthday)

## KAMPANJO HANS BAKKER DE LA AFRIKA KOMISIONO DE UEA

### Celoj de la projekto:

1. Krei Esperanto-klubojn en ĉiuj landoj de Afriko, kie ankoraŭ ne estas Esperanto-agado, kaj aktivigi esperantistojn tie, kie jam ili estas kun aparta atento al la delegitoj de UEA kaj junularaj delegitoj.
2. Partoprenigi afrikanojn, ĉefe membrojn de la Afrika Komisiono (AK), en diversaj virtualaj renkontiĝoj, por adaptiĝi al la nuna monda situacio.

### Praktikaj agadoj:

1. Dividi Afrikon en regionojn kaj ĉiu membro de la Afrika Komisiono estu respondeca pri unu regiono.
2. Ĉiu membro de la Afrika Komisiono klopodos trovi kontaktojn en ĉiuj landoj de sia regiono kaj ofertas perkorespondajn kursojn. Tio okazos per reta varbado, dissendo de informiloj aŭ alia varbmetodo.
3. Daŭra korespondado de la komisionanoj kun unuopaj aktivuloj kaj kluboj jam ekzistantaj por aktivigi ilin.
4. Raportado regule okazos tra la Afrika Bulteno, la revuo de UEA kaj la retejo de la Afrika Komisiono, kaj, kaze de problemoj, la Afrika Komisiono kaj kunlaborantoj klopodos trovi solvon.
5. La Afrika Komisiono sin devigas redakti agadplanon ĝis 2022 kaj vaste diskonigi ĝin.

**Bezono:** Unue, ni bezonos ĉirkaŭ 1 000 eŭrojn por 5 komputiloj de aktivaj membroj de la Afrika Komisiono. Ni pensas, ke eblas havi bone funkciantan komputilon en Afriko per 200 eŭroj, sed provizantoj de uzataj komputiloj estos kontaktitaj.

**Observoj:** Ĉi tiuj komputiloj iom urĝas, ĉar tiel la AK-anoj kapablos partopreni la Virtualan Kongreson kaj aliajn virtualajn Esperanto-kunvenojn en la sekvaj monatoj kaj plie spertiĝi.

Indas doni iom pli da mono por ankaŭ helpi pagi interretan krediton.

Ni supozas ke pliaj kluboj povus finance subteni almenaŭ parton au tutan komputilon. Se ni kolektos pli da mono ol necese nun, ni ĉiam povus uzi tion poste okaze de tio, ke ies komputilo difektiĝos, aŭ por doni al aktivuloj kiuj ne estas membroj de la Afrika Komisiono, sed de la konsilantaro de la Komisiono.

**Iniciatintoj:** Sabiyumva Jeremie: estrarano de UEA pri Afriko, Elisee Byelongo, Afrika Komisiono de UEA, Renato Corsetti, Komisiito de UEA pri Landa Agado, Heidi Goes, aktivulino pri Agado en Afriko.

**Pagmanieroj:** [uea.org/alighoj/donacoj/afriko](http://uea.org/alighoj/donacoj/afriko) kun la indiko "por la konto Afriko-komputiloj" aŭ rekta [Paypal-ligilo: paypal.com/donate?hosted\\_button\\_id=LMXLGAJ7746GC](https://www.paypal.com/donate?hosted_button_id=LMXLGAJ7746GC)

## **ALIĜILO KAJ TEMO DE LA 107-A UK (MONTREALO): "LINGVO, VIVO, TERO: JARDEKO DE INDIĜENAJ LINGVOJ"**

Malfermiĝis la aliĝilo de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), kiu okazos en Montrealo, de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 2022. Frue aliĝu por ĝui la plej bonajn aliĝkotizojn: [uea.org/kongresoj](http://uea.org/kongresoj).

La kongresa temo estas: "Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj". La temon proponis la Loka Kongresa Komitato (LKK) de Montrealo kunlabore kun la eks-prezidanto de UEA Mark Fettes kaj la Estraro de UEA. La Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj estis deklarita de UN kaj Unesko fine de la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj, kiu ludis gravan rolon en la agado de UEA kaj en la pritrakto de la kongresa temo de la 104-a UK, "Vivanta naturo, floranta kulturo" en 2019. Nun la 107-a UK estos unu el la internaciaj aranĝoj, kiuj helpas lanĉi la Jardekon por la periodo 2022-2032. La atento al indiĝenaj lingvoj nekontesteble praviĝas, ĉar ili entenas grandan parton de la lingva kaj kultura diverseco de la homaro kaj estas la portantoj de valoroj kaj praktikaj konoj, kiuj montras kiel homaj socioj povas kunvivi harmonie kun la naturo. Kaj malpli pozitive: ĉar ili grandparte estas minacataj ! de malape ro. Pri tio la LKK preparis [specialan gazetaran komunikon](#) en la angla kaj en la franca por diskonigi en Kanado, i.a. okaze de la 26-a de julio.

Esperantistoj jam delonge montris sin konsciaj kaj engaĝitaj pri lingvaj rajtoj kaj scivolemaj pri la apartaĵoj de malpli konataj lingvoj – do la du unuaj vortoj de la temo invitas nin al konatiĝo kun la fascina panoramo de indiĝenaj lingvoj kaj kun la streboj por ilin vivteni kaj revigligi. La tria vorto, "tero", atentigas nin pri la bataloj de indiĝenaj popoloj por la rajto mastrumi siajn proprajn teritoriojn, sed ankaŭ memorigas, ke tia indiĝena mastrumado estas efika strategio por konservi arbarojn kaj aliajn ekosistemojn. Tiamaniere la temo ankaŭ ligiĝas al la diversaj engaĝiĝoj de UEA kaj la Esperanto-movado, subtene al la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo (CDE) de Unuiĝintaj Nacioj. La graveco de lingva diverseco por la realigo de la Celoj certe troviĝos inter la ĉefaj diskuttemoj en Montrealo.

La prezidanto de UEA, Duncan Charters, komentis pri la temo: "La tero estas la kunteksto de la kiel eble plej diversa koncepto de vivo. La sankteco de niaj rilatoj kun la komune posedata kaj posedanta tero estas aparte rimarkebla en indiĝenaj kulturoj. Kaj la lingvoj estas la plej alta kaj plej diversa esprimiĝo, kiu en diverseco povas ĉiujn unuigi".

Ne maltrafu dum la 2-a Virtuala Kongreso, okazanta, partopreni la montrealajn programerojn ([vk.retevent.com/programo?s=Montrealo](http://vk.retevent.com/programo?s=Montrealo)) kaj la babilrondon pri indiĝenaj lingvoj kun Mark Fettes ([vk.retevent.com/programo?s=Kanado](http://vk.retevent.com/programo?s=Kanado)). Aliĝi al la VK eblas per [vk.esperanto.net](http://vk.esperanto.net).

## **EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON!**

Beh, fonetice estas ĉi tiu...

